



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 167

Marto 2000

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15



UNUA LETERO (SATIRO)

de Mihail **EMINESKU**



iam kun palpebroj lacaj kandelflamon mi forblovas,
Longan vojon de la tempo nur horloĝo sekvi provas;
Ĉar vespere la kurtenon kiam oni flankenŝovas,
Kaj de lun' volupta flagro ĉion en la ĉambro trovas,
Tiam ĝi eltiras tuton el la nokto de memoroj,
Kvazaŭ en la song' sentatan eternecon de doloroj.

Luno vi, de maroj estro, sur la volb' de mondo glitas

Kaj donante al la pensoj vivon, vi afliktojn spitas;
Mil dezertoj, mil kaj mil, sub via ĉasta lum' fajretas,
En la ombro fontobriilojn kiom da arbaroj kovas!
Kiom milojn da ondadoj via regno traŝiradas,
Kiam sur solec' movriĉa de la maro vi flosadas!
Kiom da florantaj bordoj, kaj palacoj, burgoj, em'
Via estas, de via ĉarmo penetritaj montri sole al vi mem!
Kiom miloj da fenestroj vi penetris, milda gem'
Kiom da pensozaj fruntoj vi rigardis kun pensem'!
Vidas reĝon kiu plektas jarcentplanon al terbul' —
Kiam al morgaŭa tag' apenaŭ pensas malriĉul' —
Kvankam ilin grad' malsama venis el la urn' de sorto,
Same estras via lumo kaj ĝenio de la morto.
Enĉenitaj al identaj, de pasioj vic' kaj rot',
Ĉu malfortaj, ĉu potencaj, geniul' aŭ idiot'.




Unu ĉe spegul' rigardas al harara sia ond',
 La alia serĉas veron en la temp' kaj en la mond',
 Krustojn mil kolektas li de sur folioj flavaj, por
 Runi la pasemajn nomojn sur noĉstango kun fervor',
 Dum alia disparcelas mondon ĉe tablet' de varo,
 Elkalkulas oron de la nigraj ŝipoj sur la maro.




Jen, maljuna instruist' kun eluzita sia vesto,
 En kalkulon tute dronas, frostetante en la nesto,
 Li tremante butonumas al si la malnovan robon,
 Ŝtopas la orelojn vate, kolumigas sian kolon,
 Sekiĝinta kiel estas kurbiĝinta sentaŭgul',
 Li senfinan Universon en etfingro havas rul',
 Ĉar sub lia frunt' estonto kaj pasinto koheriĝas,
 la noktofondon de l'eterno per serioj li deĉifras.
 Kiel Atlas' la antikva la ĉielon sur la ŝultro,
 Tiel li apogas mondon kaj eternon per la nombro.
 Dum la lun' brilegas super la volumruinaj aroj
 Por moment' lin penso portas reen kun mil kaj mil jaroj
 Al komenc', kiam estis est', neest' sen ia rolo,
 Dum ankoraŭ ĉio estis mank' de viv' kaj mank' de volo,
 Kiam kaŝis sin nenio, kvankam ja kaŝita ĉio,
 Kaj de mem penetrite ripozis nepenetrata io.
 Ĉu ravino? ĉu abismo? ĉu la tajdoj ludis kirlon?
 Mankis mondo perceptebla, ankaŭ mens' kompreni tion.
 Ĉar mallumo estis tia, kia sen radi' la maro,
 Sed vidindo eĉ ne estis, nek okul' por vidindaro,
 Disvolviĝis nek la ombro de la nefarita spaco,
 Kaj per si mem pacigita estris la eterna paco !

Sed subite punkt' sin movas ... la unua, sole, jene,
 El ĥaos' patrinon faras, el si mem la patron, pene.
 Tiu punkto de moviĝ', malforta pli ol gut' de ŝaŭmo,
 Estas la senlima estro super limoj de la kosmo.
 Ek de tiam nebul' eterna disfalas laŭ strigent'
 Ek de tiam mond' aperas, luno, sun', praelement',
 Ek de tiam ĝis nun perdiĝintaj mondkolonioj
 Venas el nebulaj valoj de ĥaos' sur nubaj vojoj,
 kaj, po lumaj svarmoj el la infinit' ŝprucanta driv'
 Per dezir' senfina estas allogata al la viv',
 En ĉi tiu granda kosmo, idoj de malgranda mond'
 Faras ni, sur nia tero, formikejojn en la rond'!
 Mikroskopaj ni, popoloj, reĝ, soldato kaj cezar',
 Laŭ generacio sekvas, kredas nin mirindaj, ĉar
 Muŝoj efemeraj, mondon ni mezuras per kubuto,
 Volvas nin en senlimecon kaj forgesas ke la tuto,



Kio nia mondo estas, pendigita nur momento,
 Ĉirkaŭ kio la mallumo, antaŭ kaj ja post evento.
 Kiel polvo ludas en la imperio de radio
 Mil fadenojn blu-violajn, kaj ĉesantaj kiam tio:
 Tiel en la nokt' profunda de la eternec' ni havas
 La momenton, la radion, kio poste plue daŭras;
 Kune kun ĝi ja pereos, kiel ombro en malhelo,
 Ĉio, ĉar song' de neesto estas Univers-ĥimero.



Dum estanto, la pensulo ne haltigas sian menson,
 Nur moment' lin pens' jarmilojn portas en antaŭensendon;
 Li la sunon, nun belegan, vidas trista, ruĝa glob',
 Kiel vundon fermiĝantan meze de malhela nub',
 Kiel la planedoj frostas ribelantaj en la spac',
 Sin savinte el la bridroj de la lum' kaj sun' post lac';
 De la mond' ikontrabaron en la fund' nigrigis pel',
 Kiel la foli' aŭtuna jam pereis ĉiu stel';
 La mortinta temp' etendas sian korpon ĝis eterno,
 Kaj nenio plu okazas en dezerta spacosterno.
 Ĉio falas kaj silentas en neestonokto tiam,
 ĉar en si mem pacigita jam revenas pac' por ĉiam.

.....

Komencante ek de plando mem de granda homa ar'
 Kaj suprenirante ĝis la reĝaj fruntoj sur ŝtupar',
 Turmentataj vidas ĉiujn ni de sia vivmister',
 Kiuj do pli malfeliĉaj nun el ili sur la ter'?'
 Ni ne scias diri tion, unu estas ja en ĉiuj;
 Kiu povas suprengrimpi, ja leviĝas super ĉiujn,
 Dum aliaj en la ombro kaj kun sia kor' humila,
 Nekonataj eĉ pereas kiel ŝaŭmo nevidita;
 Kion blinda sort' prizorgas pri ilia vol' kaj pens'?'
 Kiel la ventblov' ĝi pasas tra la homa viv' kaj cens'.

Feliĉigu lin verkisto, tuta mondo lin honoru! —
 Kion el ĉi ĉio havos por si mem la maljunulo?
 Senmortecon, oni diros. Vere lia tuta vivo,
 Kiel la heder' al arb', sin krampas al ideodrivo
 “ Se mi mortos — al si diros li kun vervo — mian nomon
 “ La centjaroj portos kun si, buŝ' al buŝ' en ĉiun domon,
 “ Ĉiam, ĉien; rifuĝejon, en angul' de iuj cerboj,
 “ Kune eĉ kun mia nomo, certe trovos miaj verkoj!

Ho, povrul'! Ĉu vi memoras, kiom aŭdis vi en la mond'?'
 Kio preterpasis, kiom diris vi en via rond'?

Tre malmulte; nur kelkloke strion de imagbildo,
 Iun spuron de la penso aŭ peceton de papero.
 Kaj se vian propran vivon vi ne scias ja laŭ vort',
 Ĉu aliaj rompos al si sian kapon por la port'?
 Eble iu harfendulo kun okuloj verdaj, jam
 Inter la ruiniĝintaj libroj mem kaduka sam'
 Vian lingvan atikecon metos sur pesilon volb'
 Senpolvigos okulvitrojn de el la libr' devena polv',
 Kunpremos vin en du liniojn, al la vost' zorgante lokon
 Por vi mem sub stultan paĝon en debilan iom noton.
 Povos vi konstrui mondon, povas vi frakasi tion,
 Kaj nur ŝovelil' de tero demetiĝas super ĉion;
 Mano kiu ekdeziris sceptron de la Universo,
 Pensoj kiuj ĝin entenis, enlokiĝas sen diverso
 Inter kvar tabuloj lignaj. En la marŝo enteriga
 Pompa kiel ironio, kun rigardoj apatiaj
 Oni vin postsekvos pie. Super ĉiuj
 ekparolos homaĉo, ne vin glorante,
 Sed sub la ombro de via nom', sin mem briligante.
 Jen do kio vin atendas.



Sed vi vidu ... posteuloj ankoraŭ pli juste censas.
 Ne povante vin atingi, ĉu admiros vin, la flagran?
 Ili nur aplaŭdos certe la biografion magran,
 Kiu provos montri ke vi eĉ ne estis granda io,
 Ke vi estis kiel ili, hom', kaj ĉiun flatas tio,
 Ke vi ne pli ol ili estis. Ulajn nazojn kiu ajn
 Blovŝveligas en kunsidoj sciencaĉaj ja kun gajn'
 Kiam pri vi oratoras. Konvenciis jam antaŭe,
 Ke li laŭdu vin per vortoj, kun grimaco, ironie,
 Tiel sur kelkies mano vin falintan, ili penos
 Do korekti kaj malbone taksi kion ili ne komprenos,
 Sed en via viv', krom tio, ili serĉos trovi misojn,
 Multe da makuloj, eble eĉ skandalajn frisojn;
 Ĉio ĉi alproksimigas vin al ili. Ne la lumo kiun vi
 Al mond' radiis, sed la kulpoj kaj peksumo,,
 La laceco, malforteco, ĉiuj malbonecoj per
 Kiuj vi ligita estas mem al unu man' da ter',
 Ĉiuj etaj mizeraĵoj de animo kaj de mens'
 Multe pli altiros ilin ol la bril' de via pens'.

.....



Inter muroj, intere de arboj forskuantaj siajn florojn,
 Kiel plena lun' disŝutas siajn pompajn briloorojn!

El la nokto de memoroj mil deziroj ĝi elprenas,
 Kun doloroj mildiĝintaj kvazaŭ el song' alvenas
 Ĉar en nia propra mond' malfermas ĝi eniran pardonon,
 Post esting' de la kandelo vekas ĝi ja multajn ombrojn.
 Mil dezertoj, mil kaj mil, sub via ĉasta lum' fajretas,
 En la ombro fontobrilojn kiom da arbaroj kovas,
 Kiom milojn da ondadoj via regno traŝiradas,
 Kiam sur solec' movriĉa de la maroj vi flosadas!
 Ĉiujn kiuj en ĉi mond' subigitaj al la sorto,
 Same estras via lum' kaj la ĝenio de la morto.



Ĉi tiun poemon, verkis Mihail Eminescu [Eminesku], la plej vaste konata rumana poeto. La nomo de la poeto estis kaŝnomo de Mihail Eminovici, kiu naskiĝis je la 15a de januaro, 1850, en Moldavio (tiam en la turka imperio) kaj mortis je la 15a de junio, 1889, en Bukareŝto, Rumanio. Influita de okcidenta literaturo, germana filozofio, kaj hinda mistikismo, li kreis poezian skolon en Rumanio. Li uzis simplan lingvon kaj estis majstro de rimo kaj versado. Profundeco de pensado kaj fleksibleco de esprimo estis karakterizoj de liaj verkoj. Li emis al melankolio, kaj en la lastaj kvin jaroj de la vivo li suferis mensan malsanon. Oni rimarku, ke li aĝis nur 39 jarojn kiam li mortis. [La supraĵo estas el informo de la interreta versio de la Enciklopedio Britannica.]

Jozefo Ladislao Viktoro Lenkei, maljuna kaj fervora Esperantisto en Oradea (Rumanio), la poemon tradukis esperanten.



NOVA ESTRO POR POLA RADIO, ESPERANTO-REDAKCIO

Post pli ol 40 jara kariero, la estro de la Esperanto-redakcio de Radio Polonia emeritiĝis kaj transdonis la estradon al sia koleginino. La 6-an de aprilo 1959 unuafoje Andrzej Pettyn eniris la sidejon de Pola Radio, kie li pasigis multajn jarojn. La 29-an de februaro 2000 estis lia lasta labor-tago, sed li daŭris la laboron dum la cetero de la semajno ĝis dimanĉo, la 5-an de marto, kiam oni anoncis ke lia koleginino Barbara Pietrzak transprenas la rolon de estrino de la Esperanto-redakcio. Li ankaŭ promesis, ke li plue kunlaboros en iom limigita grado.

daŭras ⇒


Dum jaroj oni devis pensi pri Andreo Pettyn kiel la voĉo de Pola Radio kaj la voĉo de Esperantio por tiuj, kiuj nur povis aŭdi Esperanton per la radio. Li faris elstaran kaj grandegan kontribuon al la vivanta formo de nia lingvo parolata tra la mondo. Tial, ni deziras tutkore danki al li pro la jardekoj da laboro, kaj deziri al li ĉion bonan dum la emeritiĝo.

Intertempe, per interreta radio oni povas ĉiutage trovi freŝan, duonhoran programon de Pola Radio en Esperanto ĉe la adreso:

<http://www.wrn.org/ondemand/>.



Bob Williamson
nome de la legantoj de *Inter Ni*



- ☺ Kial mi maltrankviliĝu pri kvanto de kolesterolo en mia sango? Mi veturigas tro rapide por tio.
- ☺ Mi ne povis ripari la bremsojn ĉe via aŭtomobilo — do, mi plilaŭtigis la hupilon.